NESKUEBLA FIDO ESTAS NUR TIU, KIU POVAS REKTE RIGARDI LA RACION EN ĈIUJ AĜOJ DE LA HOMARO
(El Evangelio laŭ Spiritismo)

Esperanto-Aldono

La Spirito estas la Viviganto;
LA KARNO NENION UTILAS;
La Vortoj, kiujn mi diris al vi, estas Spirito kaj estas Vivo.
(El La Sankta Biblio en Esperanto)
Trad. D-ro Zamenhof

OFICIALA ORGANO DE LA GRUPO ESPERANTO KAJ FRATECO

1-a Jaro — BAGÉ, Februaro 1965 - Rio Grande do Sul - BRASIL (Brazilo) — N-ro 9

Aŭtoritateco De La Spiritisma Doktrino

Universala kontrolo de l' instruado de la Spiritoj

Traduko de Isȃmael Gomes Braga

(Sekvo de la pasinta numero)

Ne al la opinio de unu sola homo oni aliĝos, sed al la unuanima voĉo de la Spiritoj; ne unu homo, ĉu mi, aŭ alia fondos la spiritisman ortodoksecon; ne ankaŭ unu Spirito, trudanta sin al iu ajn, sed ja la tuto de la Spiritoj, manifestiĝantaj sur la tuta tero laŭ ordono de Dio; tie estas la esenca karaktero de la spiritisma doktrino; tie kuŝas ĝia forto, tie ĝia aŭtoritateco. Dio volis, ke Lia leĝo sidu sur neskuebla bazo, kaj tial Li ne ripozigis ĝin sur la malforta kapo de unu sola homo.

Antaŭ tiu potenca areopago, kiu ne konas intrigojn, ĵaluzajn konkurojn, sektojn, aŭ naciojn, rompiĝos ĉiaj kontraŭajoj, ĉiaj ambicioj, ĉiaj pretendoj je individua superregado, kaj ni mem ankaŭ rompiĝus, se ni volus anstataŭigi ĝiajn superegajn dekretojn per niaj propraj ideoj; nur ĝi fermus ĉiujn diskutatajn demandojn, silentigos ĉiujn skismetojn, rekonus pravecon ĉe tiu, kiu pravas, aŭ kontraŭe. Antaŭ tiu impona akordo de ĉiuj voĉoj el la ĉielo, kiom valoras la opinio de unu homo aŭ de unu Spirito? Malpli ol guto de akvo, kiu perdiĝas en la Oceanon, malpli ol infana voĉo sufokita de l'uragano.

La universala opinio estas da superega juĝisto, kiu eldiras la lastan decidon; ĝi formiĝas el ĉiuj individuaj opinioj. Se unu el ĉi tiuj estas vera, ĝi influas sur la pesilo nur per sia pezo propra. Se unu el ili estas falsa, ĝi ne povas pezi pli ol ĉiuj aliaj. En tiu vastega kontribuado, la individuoj forviŝiĝas, kaj tie estas nova malsukceso por la homa fiero.

Tiu harmonia tutaĵo jam reliefiĝas; nu, tiu ĉi jarcento ne forpasos, antaŭ ol ĝi elstaros kun sia tuta brilego, por forviŝi ĉiajn necertaĵojn, ĉar de nun ĝis tiam potencaj voĉoj estas ricevintaj la mision esti aŭdataj, por kunvenigi la homojn sub la saman standardon, kiam la kampo estos sufiĉe antaŭpreparita. Ĝis tiam, iu, kiu ŝanceliĝas inter du kontraŭaj sistemoj, povas observi, kiun direkton iras la ĝenerala opinio: tio estas certa signo de la direkto elektita de la plimulto el la Spiritoj pri la diversaj punktoj, pri kiuj ili komunikiĝas; tio estas ne malpli certa signo montranta, kiu el ambaŭ sistemoj venkos. - El la Evangelio laŭ Spiritismo - unua eldono en Esperanto de Brazila Spiritisma Federacio.

La Vera Frateco

J. F. Mota

Oni alparolas pri frateco; la neceso pri unuiĝo de la popoloj estas parolata; estas sciite, ke multaj dezirespimas pri la kunmiksiĝo de ĉiuj religioj, sed oni forgesas ofte la Toleremon. Ĉiu volas rajti diri, ke la Vero estas kun li mem spite de la maniero per kiu ĝin li konsideras. Tamen okazas, ke ĝenerale la homo malŝatas cedi sian antaŭjuĝon, kiun li faras pri la Vero, favore al konceptoj de aliaj kaj tial ekaperas malkompreno ne nur inter personoj sed ankaŭ ĉe religiaj kredoj. Se ankoraŭ estas malfacila interkompreno pri multaj dogmoj, ĉar ĉiu religio sin taksas posedanta la Veron, kial do povas la homoj subteni konceptojn pri frata toleremo?

Se inter la diversaj kredoj okazus la vera frateco per simpla toleremo, certe ne estus desigismo inter homoj de malsimilaj religioj kaj ĉiuj vivus tolereme kun la similuloj, ne dezirante esti la solaj tenantaj la veron.

La Vero mem estas progresiva kaj evoluas kun la progreso de la homo, kaj ĉiuj rajtas kompreni ĝin, kiel eble, laŭgrade de sia mem stato pri evoluado, tial al ĉiuj rajtas prikonsideri kaj opinii pri siaj konceptoj, sed tolereme al la konceptoj de la aliaj.

La mondo fariĝos ju pli progresema des pli da toleremo estos ĉe homoj kaj religioj, ĉar nur la instruoj de la Kristo objektivaj praktikitaj de ni ĉiuj alvenigos en nian planedon pli feliĉan eraon plena de frata solidareco.

Ni, spiritistoj, meditu pri tio.

Esperantigis W.

Spiritismaj Junularoj Kaj Esperanto

Unua Kunfratigo de la Spiritistaj Junularoj de Brazilo

Ni ricevis afablan informon pri la unua kunfratiĝo de la spiritistaj junularoj de Brazilo, kiu okazos en Marilia, moderna urbo de ŝtato de Sankta Paulo, de la 15-a ĝis la 18-a de la proksima Aprila monato,

Ĉar la informo estas iomete longa, resume ni sube transskribas la programon laŭ informis Rio Esperantista:

1. Unu el la plej grandaj Esperantaj eksposicioj. Diversaj temoj, inkluzive tiu spiritista-esperantista.

2. Disvendado de libroj en kaj pri Esperanto laŭ la aĉetprezo, TUTE SEN KOMERCA PROFITO, same kiel estis farita ĉe UBERLÂNDIA, okaze de la 16-a Kunveno de Spiritismaj Junularoj, aprilo 1963.

3. Kinematografa sesio por montro de kolora filmo, pri la naturo, daŭro de 25 minutoj, kun vortoj en Esperanto.

4. Ĉiutaga radiofonia programo, eble dum duonhoro, koincide kun la tagoj de la Kunfratigo, en kaj pri Esperanto-Spiritismo.

5. Laborkunsido kun prezentado kaj diskutado de la ĉefaj temoj:

a. Simpla sed objektiva laborplano por disvastigo, informado kaj instruado de Esperanto ĉe la spiritistoj, cele al la triobla idealo (Evangelio, Spiritismo, Esperanto "ESE"), adaptita al la "Spiritismaj Junularoj".

b. La bezono de starigo de "Spiritismaj Esperanto-Grupoj".

6. Disdonado de paperujoj kun kolekto de propagandiloj esperantistaj por la spiritistoj, kopiaĵoj de mesaĝoj, de la opinioj de Bezerra de Menezes, Isȃmael Gomes Braga k. a.

Por aliaj informoj bonvolu skribi al la poŝtkesto, 206, Uberlândia (MG).

VI SCIAS

Tiom, kiom la mediumoj, ni ĉiuj ricevas.

En la asimilado de la spiritisma ideo ni ĉiuj ja ricevas unu lumon nutrita per la esenco de la Evangelio.

Kaj la misio de la lumo estas, super ĉio, senvualigi, por ke ni povu kompreni.

Tiel, ni ĉiuj tenas la superan kapablon kompreni por helpi.

—O—

Tiamaniere, neniam asertu sen orientiĝo.

Vi scias, ke vi troviĝas sur la Tero ne nur elpagante vian pasintecon, sed ankaŭ konstruante vian estontecon.

Vi scias, ke viaj enigmoj-parencoj estas, verdire, kreditoroj postlasitaj de vi en fora pasinteco, nun ree kolektitaj en la rondo de via ĉiutaga ekzistado, por ke vi elpagu la ŝuldojn faritajn de via animo mem kaj lernu kiel doloras malfaciligi la destinojn de la aliaj.

Vi scias, ke la ofendintojn aliigitaj al turmentistoj plejofte estas grandaj obseditoj, dismetitaj de ombraj estuloj ĉie antaŭ vi, kvazaŭ daŭraj provoj per kiuj vi povu praktiki elmontri la virton, kiun vi instruas.

Vi scias, ke la malfacilaĵoj, similaj al magnetaj dornarbetoj sur la laborkampo, estas rimedoj, kiujn la vivo disponigas al vi, por ke vi ne malsukcesu en la kokerado de sperto.

Vi scias, ke la doloro, ŝajnanta nevidebla karbardaĵo en la penso, havas la funkcion atentigi vin kontraŭ pli grandaj faloj sur la glitejo de l' malklereco.

—O—

Plenigu do vin per karitemo kaj pacienco, se vi aspiras al la plenumo de via devo,

La prezo de l' venko nomiĝas lukto.

Spiritisma ideo estas lampo lumanta, por ke ni ĉiuj klare vidu, kaj la ekzistado sur le Tero estas vojo al la Supera Sfero.

Ne plendu, se la suprenirado estas teda kaj laciga pro la kruco, kiun vi portas.

Preĝu por viaj persekutantoj kaj benu viajn ofendantojn.

Ĉiuj, kiuj kredis esti mem neniigintaj la Kriston, apenaŭ sukcesis transformi lin al luma gvidmarkilo.

EMMANUEL
(Mediume ricevis Francisco Cândido Xavier)
Tradukis Benedicto Silva
Americana, SP

OPINIO DE S-RO ALLAN KARDEC

Neniu homo havas kompletajn kapablajn; per la socia kolektiĝo la homoj sin reciproke kompletigas, por certigi al si bonfarton kaj progresadi. Ili havas reciprokajn bezonojn, kaj tial ili estas destinitaj vivi ne izole, sed socie. (Komentario pri la demando 768 de "La Libro de la Spiritoj", traduko de Prof. Porto Carreiro Neto).

La bonaj verkoj

En la dua semestro de la pasinta jaro la esperantistaro akceptis, kun granda ĝojo, la aperon de eksterordinara vortaro, kiu venis plenumi gravan rolon inter ĉiuj lernantoj de la internacia lingvo de Zamenhof. Traktas pri la "Grande Dicionário Esperanto-Português" de Prof. Ismael Gomes Braga eldonita de Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio de Janeiro.

La verko estas monumenta kaj erudicie prezentas ĉiujn temojn facile lerneblaj kaj per tia rimedo, ke lernantoj de ambaŭ gradoj de studoj trovas plej grandan facilecon elekti la precizan vorton por la dezirata senco. Estas sciate, ke ordinaraj vortaroj bilingvaj kontentiĝas nur menciante la vorton per unu lingvo kaj la respektivan tradukon per alia, kio, kompreneble, ne sufiĉas, ĉar se la konsultanto ne komprenas la sencon de la aludita vorto - aŭ la plurajn sencojn de la tradukajo, certe li devas foliumi aliajn vortarojn. Se li havas tiajn leksikonojn des pli bone, sed se male okazas, estas tute certe, ke li restos en la sama nescieco. Ekzemple: Abako - ábaco, Abatiso - abatis, Aberacio - aberração, Absido - ábside, Adiabata - adiabático, Afelio - afélio, Afrodizio - afrodisia, Agariko - agárico, Agato - ágata, Agnostikismo - agnosticismo, kpt.

Tiu, kiu ne komprenas la unuan el tiuj vortoj, same ankaŭ malfacile komprenos la duan, kvankam tiu ĉi lasta estas en portugala lingvo.

En tiuj ĉi kazoj la "Grande Dicionário Esperanto-Português" mencias per mallongaj difinoj la diversajn sencojn de ĉiu el tiuj ĉi vortoj. Ekzemble: **Abako** - ábaco. 1. Parte superior do capitel da coluna, em que se assenta a arquitrave. 2. Calculador mecânico para aritmética, formado de um quadro com vários fios longitudinais e paralelos, em que deslizam botões ou bolas móveis. 3. Desenho geométrico para substituir cálculos, em problemas de tiro, por meio de linhas. **Abatiso** - abatis (mil.: estacada feita de árvores abatidas). **Aberacio** - aberração 1. Deserranjo na situação ou exercício dos órgãos do corpo. 2. Estravagância, êrro de raciocínio. 3. Dispersão dos raios luminosos que atravessam corpos diáfanos. 4. Movimento aparente das estrêlas fixas. Kaj tiel plu.

Alia diferenco trovebla en la "Grande Dicionário Esperanto-Português" estas tia, ke ĝi ne mencias nur la afiksojn en Esperanto, sed aludas al ĉiuj internacia elementoj formantaj kunmetitajn vortojn en ambaŭ idiomoj cele enriĉigi la vortaretojn de ĉiu lernanto, ĵene: **al, ato** - sufixos empregados em química; **di** - prefixo usado em química; **anti** - (contra); **bio** - (vida); **bradi** - (lentidão); **cefal** - (cabeça); **fiebo** - (veia; **gero** - (de velho); **gloso** - (língua); **graf** - (escrita); **hemo** - (sangue); **hidro** - (água); **hiper** - (demais); **hipo** - (de menos), kaj tiel plu.

Tiuj ĉi elementoj devas esti studataj, ĉar aperas ĉie en pluraj lingvoj, kiel internaciaj.

Ĝi estas eksterordinara vortaro per kiu oni povas konsulti pri vortoj, ankaŭ por lernado de ambaŭ lingvoj. Krom ĉiujn difinitajn vortojn troveblaj en "Plena Vortaro de Esperanto" kaj en "Suplemento", la "Grande Dicionário Esperanto-Português" enhavas milojn da aliaj, kiuj fariĝas la plej bona fonto por satigi la soifon de ĉiu studema Esperantisto.

La kvincentpaĝa volumo de la verko de Prof. Ismael Gomes Braga entenas multe pli da novaĵoj lerneblaj ol la ordinaraj vortaroj kaj ĝia apero inter ni sendube pliriĉigas la eblon alparoli kaj skribi ne nur pere de la idiomo de Zamenhof, sed ankaŭ donas al la leganto de portugala lingvo sufiĉe da kontentigo eĉ al tiuj plej grumblemuloj...

La Redaktoro

El la Evangelio laŭ Spiritismo

Instruoj de la Spiritoj

Regado de la Spirito de Vero

Tradukis Ismael Gomes Braga

Mi estas la granda kuracisto de l'animoj, kaj mi venas alporti la kuracilon, kiu devas vin resanigi; la malfortuloj, la suferantoj kaj malsanuloj, estas miaj preferataj filoj, kaj mi venas savi ilin. Venu do al mi, vi ĉiuj, kiuj suferas kaj estas ŝarĝitaj, kaj vi estos malŝarĝitaj kaj konsolataj; ne serĉu aliloke forton kaj konsolon, ĉar la mondo estas senpova por ilin doni. Dio faras al viaj koroj superan alvokon per Spiritismo; aŭskultu ĝin. Malpieco, mensogo, eraro, nekredemo estu elradikigitaj el viaj dolorantaj animoj; ili estas monstroj, kiuj elsuĉas vian plej puran sangon kaj faras en vi vundojn preskaŭ ĉiam mortigajn. En la estonteco, humilaj kaj submetitaj al la Kreanto, vi praktiku la dian leĝon. Amu kaj preĝu; estu obeemaj al la Spiritoj de la Sinjoro; voku Lin el la fundo de via koro; tiam Li sendos al vi Sian Filon tre amatan por instrui vin kaj diri al vi ĉi tiujn bonajn vortojn; Jen mi estas; mi venas al vi, ĉar vi min vokis. (La Spirito de Vero, Bordeaux, 1861)

Ne perdu la Esperon!

Ne perdu, fratoj, la esperon
de la alveno de pli bonaj
por ĉiuj tempoj kaj progreso
de la ideoj fruktodonaj!

La semoj de l' ideoj ĝermas
en preparitaj la hommensoj;
la pluvo de l' sufero ilin
kreskigas sur la kamp' de l' pensoj.

La suno, vento ilin nutras
dum la printempo kaj somero;
kaj venos tempo de rikolto,
kaj fruktojn donos la espero.

Kulturu, do, la idealojn,
se eĉ la tempo de favoras;
venkhoro venos certe, se vi
konstante kun esper' laboras.

18/8/1943. Teodoro A. Dolejŝ

(El la mediuma verko "Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo" - Eldono de le Esperanta-fako de Brazila Spiritisma Federacio),

Esperanto

Ne estas ludilo, sed seriozega afero, unu el la plej gravaj kulturfaktoroj ekzistantaj.

Ĉiam memoru pri tio kaj kondutu konforme!

FEBRUARO 1965
1-a Jaro N-ro 9

Esperanto - Aldono

Senpaga presajo flugfolie disdonata pomulte al spiritismaj gazetoj por propagando de Esperanto-Movado

—o—

Oficiala Organo de

— Grupo Esperanto kaj Frateco —

Av. General Osório, 1737 - C. Postal 369
BAGÉ - Rio Grande do Sul - BRASIL

--O--

Respondeca Redaktoro
CARLOS DE ALMEIDA WUTKE
Redaktorestro
JOÃO SEVERO
Sekretarioj
PEDRO ELIAS DIAS
JOSÉ CORREIA
ZAIRA LEAL
Direktoro Eldonanto
PAULO GUILHERME

Ĉion pri redaktado kaj korespondo de "Esperanto-Aldono" sendu rekte al Respondeca Redaktoro, Caixa Postal 206, Uberlândia, MG, Brasil. Manuskriptoj estu tajpitaj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj iom larĝa marĝeno. Traduko kaj represo de artikoloj kaj redaktaĵoj estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton. "Esperanto-Aldono" estas ricevebla laŭ peto. Tekstoj subskribitaj aperas ekster la respondeco de la Redakcio. Ricevas: "Orientador", Rua Cap. Eleutério, 398, Passo Fundo, R. G. do Sul.

VI MEM

Memoru, ke vi mem estas
la plej bona sekretario de via tasko,
la plej aktiva propagandisto de viaj idealoj,
la plej klara demonstracio de viaj principoj,
la plej alta normo de la supera instruo, kiun via spirito sekvas
kaj la vivanta mesaĝo de la altaj pensoj, kiujn vi komunikas al aliaj.

Ankaŭ ne forgesu, ke
la plej granda malamiko de viaj plej noblaj faroj,
la plena aŭ parta negacio de la altega idealismo,
kiun vi deziras ludi,
la arkiteto de viaj afliktoj
kaj la destruanto de viaj okazoj de altiĝo-estas vi mem.

(El Kristana Agendo, mediuma verko diktita de la Spirito Andreo Ludoviko al la mediumo Francisco Candido Xavier, tradukita de A. K. Afonso Costa).

LEGU KAJ VASTIGU
La Spiritisman Libron